

Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Verschiĝnt maandelĝks
Dertiende jaargang
M A A R T 1946
N U M M E R 3 (141)

Vertegenwoordiger in Nederland :
NEDERLANDA ESPERANTO-CENTRO
Diegaardesingel 96, Rotterdam-C
Girorekening : 272818 van N. E. C.

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO v.z.w.
Redactie en Administratie :
Pieter van Humbeekstraat 3, Brussel-West
Postrekening : 326851 van F. E. I.

| | | | |
|-----------------|---------|-----------------|---------|
| 5 fr.; 's jaars | 60 fr. | 5 fr.; jarabono | 60 fr. |
| Steunabonnement | 100 fr. | Subtena abono | 100 fr. |
| Voor Nederland | 4 fl. | Por Nederlando | 4 fl. |
| Overige landen | 75 fr. | Ceteraj landoj | 75 fr. |

DE NOODZAKELIJKHEID EENER WERELDTAAL

De biologische wet waarbij het ontstaan en de ontwikkeling der organen geconditioneerd wordt door de behoeften van het individu is een universeel, op ALLE gebieden merkbaar verschijnsel. Inzake wereldtaal mag worden gezegd dat de noodzakelijkheid ervan sinds onheuglijke tijden werd gevoeld, wijl het deugdelijke instrument, na een langen ontwikkelingsgang, slechts voor enkele jaren tot stand kwam.

Eeuwen geleden werd de behoefte aan een wereldtaal reeds dermate gevoeld dat verlichte geesten als Descartes en Komensky zich grondig met het probleem inlieten en dat een universeel genie als Leibnitz desbetreffend manuscripten achterliet die, in boekvorm uitgegeven, over de tweeduizend bladzijden beslaan. Wie zou, in onzen tijd van intens wereldverkeer, de noodzakelijkheid van dergelijke taal nog in twijfel durven trekken?

Het is de beroemde philoloog Jacob von Grimm die in 1860 op weinig na het geheel der principes wist te formuleeren waaraan een practisch bruikbare wereldtaal dient te beantwoorden. En het is de hooge verdienste van Dr. Zamenhof dat, op het einde van de vorige eeuw, deze principes in tastbare werkelijkheid werden omgezet in het wereldtaalproject « Lingvo Internacia » (of internationale taal), nu algemeen gekend onder den naam « Esperanto ».

Het Esperanto is sinds lang geen ontwerp meer, maar een taal steeds meer en meer gebruikelijk in de betrekkingen van internationalen aard. Op talrijke internationale congressen en conferenties heeft het zijn deugdelijkheid als spreektaal bewezen, en zijn reeds uitgebreide en steeds aangroeiende literatuur bevestigt zijn bruikbaarheid op elk gebied van de menselijke bedrijvigheid.

In tegenstelling met de oudere vorschers die een willekeurig geconstrueerde, « filosofische » taal beoogden, wist Dr. Zamenhof de gemeenschappelijke elementen uit de Indo-germaansche talen tot een homogeen geheel te verwerken, zoodat zijn Esperanto in het leven wortelt en bezwaarlijk kunstmatig kan worden genoemd. Hij was van oordeel dat een wereldtaal niet gemaakt, maar ONTDEKT moest worden. Zijn geniale schepping bezorgde hem de instemmende lofuitgingen van taalgeleerden met wereldfaam als Max Müller, Baudouin de Courtenay, Jespersen en Meillet.

Oppervlakkige geesten zijn allicht van oordeel dat een der groote nationale talen tot wereldtaal dient verheven. Onafgezien van tal van andere bezwaren is dit ondoenlijk omdat de internationale betrekkingen tusschen de volkeren wel nooit zoo vriendschappelijk zullen worden opdat men het ooit over de keuze van die taal zou kunnen eens worden. Ook zou het van kortzichtigheid getuigen zich terzake door deze of gene momenteel machtsconjunctuur te laten leiden. Het probleem vergt een definitieve oplossing. De wereldtaal zal neutraal zijn — of niet zijn!

Er is nog meer dat pleit voor de dringende noodzakelijkheid van een wereldtaal, die — hoeft het gezegd? — niet meer mag en ook niet meer KAN zijn dan een algemeen HULPtaal, de tweede voor ieder.

Er gaan stemmen op voor een doelmatiger en uitgebreider onderwijs in de levende talen, want benevens onze moedertaal hoeven we niet alleen Fransch te kennen, maar ook Duitsch en Engelsch en eenige kennis van het Spaansch wordt nu doorgaans ook van de jonge postulanten

geëischt, in afwachting dat daar nog Russisch bijkomt! Inmiddels klaagt men bitter over de slordigheid waarmee de jeugd haar moedertaal hanteert en worden noodkreten geslaakt over het te zware leerplan. Men ziet hierbij over het hoofd dat het leeren radbraken van een zoo groot mogelijk aantal talen slechts schijngeleerdheid is die we opdoen ten koste van onze effectieve kennis. Voorwaar, het is tijd dat we, het wijze woord van Nietzsche indachtig, gaan inzien dat vele talen leeren den geest slechts met woorden vult... en naar de redplank grijpen die de wereldtaal ons biedt!

E. C.

La Esperanto-Literaturo dum la Milito

Kontraste kun la lingvoj naciaj Esperanto estas, kaj sendube ĉiam restos lingvo ĉefe skriba. Sekve, se por ĉiu kulturlingvo la literaturo estas grava, por Esperanto ĝi kompreneble estas tia en supera grado.

Laŭ la ekzistanta librotrezoro Esperanto nekontesteble okupas lokon elstaran, almenaŭ se ni faras komparon kun la literaturo de malgrandaj popoloj.

Efektive, en jaro 1930 — t. e. du jaroj post la publikigo de la rezultato de la bone konata tutmonda statistiko entreprenita de la direktoro de la Esperanto-instituto por la germana regno, D-ro Dietterle de Leipzig, statistiko kiu montris, tute fidente, ke en pli ol 100 landoj en pli ol 7.000 lokoj en la mondo tiam ekzistis 126.500 esperantistoj — en jaro 1930, ni diris, aperis, por popolo de plus minus 126.500 anoj, nekonsiderante broŝuretojn kaj aliajn malgravaĵojn, rondcifere 120 libroj kun suma amplekso de 20.000 paĝoj. Alivorte: en tiu jaro, eble la plej elstara sur kampo eldona, aperis en ĉiu tria tago Esperanto-verko kun meza paĝonombro 175.

Eĉ se ni konsideras ke la Dietterle-statistiko ĉiuokaze estas tro malalta, kaj reprezentas nur parton de la tutmonda esperantistaro, ni povas agnoski ke la citita cifero reprezentas la pli-malpli organizitan, do plivaloran parton kiu estas « libroaĉeta ». Se al ĉiu el tiuj 120 eldonaĵoj ni aljuĝas mezan eldonnombron de 2.000 ekzempleroj (ankaŭ statistike pravigebla), en jaro 1930 presiĝis 240.000 Esperanto-libroj, aŭ 2 por ĉiu esperantisto.

Ĉio tio montras ke nia supra diro pri la relativa riĉeco de nia literaturo ne estas senbaza pretendo.

La XI-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista Brugge, Pentekosto 1946 (8-9-19 Junio)



Post sesjara interrompo la flandra esperantistaro denove kunvenos en kongreso... Senkompara perspektivo! Nia fidela membraro finfine havos okazon sin revidi, premi al si reciproke la manon, satbabili — kaj kunsidi por komune pristudi la kompletan refunkciigon de nia tuta organiza aparato kiu neeviteble suferis pro la militcirkonstancoj.

Kiel gloraĵ festotagoj niaj antaŭmilitaj kongresoj restis en la memoro de ĉiu malnova flandra esperantisto. En jaro 1938 Brugge jam vidis kongreson de Flandra Ligo Esperantista. Tiam tricento da esperantistoj, inter kiu kvindek da eksterlandaj samideanoj tie pasigis neforgeseble belajn tagojn. Sed kiom ajn brila ĝi estis, ĝi ne estos komparebla kun nia nunjara kongreso kiu signifos por ĉiu el ni la delonge sopiratan revidon!

Aliflanke por multaj novaj esperantistoj nia XI-a estos la unua kongreso en kiu ili partoprenos. Anticipan bonvenon al ĉiuj: malnovaj kaj novaj esperantistoj, flandraj kaj eksterlandaj samideanoj!

« Paco kaj Justeco », la loka sekcio de Flandra Ligo Esperantista, kun idealismo kaj juna fervoro jam eklaboris por inde akcepti nian XI-an. Jen ni citas la ĉefajn punktojn de la provizora programo: sabatvespere estos interkonatiĝa festo kun balo,

dimanĉe antaŭtagmeze la urbestro oficiale akceptos la kongresanojn en la urbodomo, posttagmeze Flandra Ligo Esperantista jarkunvenos en la gotika salonego de la urbodomo, vespere okazos esperantista festo, lunde ekskurso al la marbordo. Por F.U.K.E.-anoj estos aparta kunveno kaj la katolikaj kongresanoj povos ĉeesti Diservon kun prediko en Esperanto en la historia kapelo de la Sankta Sango. La organiza komitato zorgos por nemultekostaj tagmanĝoj kaj laŭdezire prizorgos loĝadon.

Sed ni ne forgesu ke kongreso estas **kunlaboro!** Grupoj estas petataj disponigi fasadflagojn, streĉtukojn kaj similaĵojn al la organiza komitato! Kiu deziras kunlabori en la dimanĉa festo sin anoncu plej eble baldaŭ!

Interkonsente kun la ligestraro la organiza komitato fiksas la kongresan kotizon je 30 fr. pagotaj al poŝtkonto 479170 de kongresa kasistino H. De Kersgieter. Generala korespondadreso: J. en M. Sabbestr. 12, Brugge.

La prezidanto de la organiza komitato,
Dr. F. ROOSE.

HELPU PER TUJA ALIĜO!

Oni ankaŭ ne pretendu ke la « formita » esperantisto malatentas la Esperanto-literaturon. Unu bone kontroleblan ekzemplon ni volas citi: La plej ampleksa verko kiu ĝis nun aperis en la internacia lingvo sen ia dubo estas la Sankta Biblio kiu nombras 1.000 dense presitajn paĝojn; ĝi aperis en aŭgusto 1926 kaj fine de decembro 1931 estis venditaj precize 5.444 ekzempleroj kaj de la (kompleta) Nova Testamento 22.727.

Sed kiel statis la Esperanto-literaturo dum la milito?

En la okupitaj landoj la eldona aktiveco estis nula, kvankam tre baldaŭ tie sentiĝis granda libromanko. Tamen Danujo estis escepto: tiu lando evidente ĝuis relativan liberecon kaj krom Esperanto-peri-


odaĵoj aperis tie foje-foje ankaŭ modesta eldonaĵo. Depost la militino kelkaj rimarkindaj verkoj atingis nin el tiu lando, i. k. — fakto atentinda kaj substrekinda — la originalaĵoj estas nombre bone reprezentitaj.

La neokupitaj sed militantaj landoj estis en iom pli favora situacio kaj en Anglujo aperis dum la milito kelkaj verkoj en aŭ pri la internacia lingvo. En Brazilo aperis kelkdekaj, i. k. estas ne nur propagandiloj kaj lerniloj, oficialaj kaj duon-oficialaj eldonaĵoj, sed ankaŭ kelkaj rimarkindaj literaturaĵoj. Kaj Portugalio havigis al ni serion da popularsciencaĵaj kajeroj.

Sed precipe en la oaza Svedlando ni rimarkis ĝojigan aktivecon sur eldona kampo. En 1943 la Stokholma « Eldona Societo Esperanto » estis 25-jara. Dum tiu kvaronjarcento ĝi eldonis pli ol 80 volumojn en preskaŭ 300.000 ekzempleroj. Malgraŭ la ekzistantaj eksportmalhelpoj ĝi dum la milito eldonis daŭre novajn Esperanto-librojn de kiuj kelkaj dume jam tute elĉerpiĝis. Nun ĝi entreprenis la aperigon de rimarkinda libro-serio kies unuaj volumoj aŭguras pri altnivela literatura valoro.

Se ni fine konsideras ke la papermanko estas la nura kaŭzo kiu malhelpas pli-malpli baldaŭan aperigon de pliampleksa, ilustrita reeldono de la bezonega Plena Vortaro, ke post 10 jaroj da traduklaboro finpretiĝis la manuskripto de la Finna nacia episo Kalevala, kaj ke en Brazilo oni entreprenos la publikigon de ampleksa volumo pri la granda sud-américa respubliko, ni povas konkludi ke nia literaturo ne nur venke travivis la deprimajn militjarojn sed sin pretigas por fonto pli intense ol iam.

ECO.



D-RO ROBERT TROGEL ESPERANTO KAJ KULTURO Tradukis el la germana: J. SCHROEDER

D-ro Trögel adresis sian broŝuron al la « kleruloj inter la malestimantoj » (de Esperanto). Ĉiu, kiu propagandas nian lingvon, renkontos tiajn mokantojn kaj atakantojn kaj estos venkata ofte per unu moka frazeto, se li ne posedas taŭgajn kontraŭbatalilojn. Pro tio estas dezirinde, ke la leganto ne nur tralegu, sed trastudu tiun ĉi traktaron. Tiam ĝi fariĝos por li tio, kio ĝi volas esti: nemalhavebla arsenalo, do akcelilo por la fina venko.

Prezo: kvin fr.
ĉe Flandra Esperanto-Instituto.

